

Kial Niaj Vidpunktoj Malsimilas Unu al Alia?

Elson Snow, Usono

*Pensado al la Budho estas fleksia je la plej mola tuŝeto.
Ĝi satigas soifon kaj la voĉĉantado lante daŭras - kiel vojirante per plezura marŝipo.*

Astronomio rigardas la lunon. La astronauto piedmarŝas sur ĝia surfaco. Poeto lirike priskribas la identan objekton en la ĉielo sed geamantoj brakumantaj senvorte rigardas unu la alian en la novluno. La maristo estas mirfrapita de la sama luno je la spegula reflektado sur la trankvilaj akvoj de la vasta oceano.

Alivorte, la astronomo, astronauto, geamantoj, poeto, maristo, ĉiuj kunkune partoprenas en la sama sfero, sed iliaj reagoj malsimilas depende de karmaj kondiĉoj. Estas rakontite en iu sutro, ke la demono fiksigardis la riveron Ganga kaj trovis ĝin kiel fluantajn puson kaj sangon; la dioj el la monto Sumero rigardis la saman riveron kaj la fluaĵo estas por ili ambrozio; por homoj, tamen, la rivero Ganga eligas freŝakvon el glaciejo de la Himalaja Montaro.

Alia citaĵo el sutroj estas jam superflua. Vidpunktoj ne similas inter homoj. La ĉefhalo en usonaj temploj enhavas budhan figuron en la sanktejo, kaj kvankam kulturaj diferencoj montras diversajn figurojn de la Budho, ikonaj principoj restas samaj tra la mondo. Ekzemple, la stupao de la templo en San Francisko konservas relikvojn kaj figuron de Ŝakjamunio Budho vestita laŭ maniero de Tajlanda tradicio. Sed la figuro en la ĉefhalo estas Amitabo Budho vestita en alimaniere kaj lia pozo tute malsimilas al la Budho en la stupao.

Oni diras, ke la modelo de la Budha figuro en la sanfranciska templo estas la Budho skulptita sur roko en Afganio, staranta tri etaĝojn alte. La Talibanaj militistoj dispecigis ĝin. Laŭ doktrino la Budha figuro en la sanktejo estas *sambhokaja* Budho (Amitabo); kaj la Budho en la stupao estas *nirmankaja* Budho (Ŝakjamunio). Ambaŭ prezentas du aspektojn de unu realeco, *absolutan* kaj *historian*. Alivorte, ni vidas budhecon el du starpunktoj.

La stupao sur la tegmento de la templo estis konstruita dum la 1930-aj jaroj por konservi la relikvojn donacitajn de la Tajlanda reĝa familio. La ilustrita versio (fotokopio) de ĉi tiea Budho pendas en mia hejma stud-ĉambro. Ofte mi esprimis mian deziron, ke tiu Budha figuro estu profesie aprezita. Ĉu ĝi estas altkvalita artaĵo aŭ nur senvalora imitaĵo por turistoj?

"Tio ne gravas," diris miaj samideanoj, "ĝi simbolas nian religian kredecon." Certe ja, mi konsentas kun li pri graveco de ties spirita kredeco, sed ne konsentas, ke ni povas ignori sekularajn valorojn en nia sekulara mondo dum nia laika stato. Ĉu ĝi estas majstre fabrikita artaĵo aŭ nur turista memoraĵo? Malgraŭ ĉio la instalaĵo estas la plej sankta loko por usonaj budhanoj!

Iam knabo sidis sur riverbordo rigarante la surfacon de la akvo spegulantan lian figuron. La bildo de la luno gracie kaj stabile sidas en la mezo de la fluo. Ĝi similas al pokalo pli bela ol orkolora vitro. Li metis siajn manojn en la akvon por forpreni la pokalon kaj tuj hejmeniris por montri la trezoron al siaj gepatroj. Sed kiam li malfermis la manojn, li trovis jam nenion. Ni similas al tiu ĉi knabo. Ni atente aŭskultas la vortojn de la Budho en la templo, sed en nia hejmo ni forgesas lecionojn de la Budha instruo. Niaj lingvaj frazoj fariĝas reta kaptilo, kaj ni enfalas en konfuzon.

Mi komencis per la demando, "Kial ni havas malsimilajn vidpunktojn?" Sed post pripensado mi devas konfesi, ke mi ne havas eĉ ideeton, kial ni ne partoprenas en la sama mensa sfero kiel korpa sfero. Mi devas konfesi, ke ĉio dependas de karma kondiĉo. Mi ofte recitas la nomon de la Budho en la lingvo sanskrita, *namo amitabhaya tathagataya*. La japanoj, kiuj instruis min, esprimas, *namo amidabutsu*. Ĉinaj budhanoj recitas, *nam' amitofu*. Mia esperanta samideano Stephen ĉantas la titolon de la Lotusa Sutro, *namu myohorengekyo*. Eĉ kristanoj ĉantas, sed tio estas iom alia afero. La cirkonstanco kaj kunteksto, doktrina kaj psikologia, estas apartigita milojn da mejloj kaŭze de karmaj kondiĉoj.